# *La Regionaj Federacioj Plene Rolu en la Tutlanda Movado*

FRANCIA MOVADO — Opinio verkita la **21[an] de Januaro 2007**

La franca Esperanto-movado konsistas el pluraj tavoloj : tutlanda, loka (urba kaj foje departementa) sed ankaŭ regiona. Al ili respondas respektive la landa asocio (Unuiĝo Franca por Esperanto), la kluboj kaj la federacioj. Se oni facile atentas pri la unuaj du asociaj kategorioj — ĉar UFE estas landskale videbla, kaj la kluboj la strukturoj plej proksimaj al la homoj —, tamen oni foje emas forgesi aŭ neglekti la ekziston kaj rolon de la regionaj federacioj.

La francian teritorion hodiaŭ kovras 15 federacioj. La federacioj nek funkcias nek aktivas same unuj kiel la aliaj. Sed ĉiuj utile rolas en la loka kaj landa movadoj. Ili ja celas vivigi Esperanton en siaj tutaj regionoj kaj kunordigi kaj subteni la klubojn ; ili regione konkretigas politikojn de UFE ; fine ili ankaŭ estas la perantoj inter la kluboj kaj UFE.

Sed, partopreninte diversajn kongresojn en Francio kun aliaj federaciestroj — mi mem prezidas la Nordfrancian Federacion —, mi havas tiun impreson, ke pluraj federaciestroj pli-malpli sen-interesiĝas pri la landa kontribuo far la federacioj, pri la landaj decidoj kaj politikoj de UFE... Eble ĉar ili prave-malprave sentas sin jam delonge ne sufiĉe priatentataj de UFE : maltro da kontaktoj inter UFE kaj la federacioj, maltro da konsultoj de UFE al la federacioj por la preparo de decidoj aŭ politikoj, manko de konstanta strukturo (interna komisiono) dediĉita al la federacioj[1]...

**« La federacioj sidas ĉe la tablo landa, sed sur seĝo lama »** — jen kiel mi kutimas vortigi tiun senton, tiun situacion. La federacioj ja ĉiujare raportas en la jarraporto de UFE, ili ja havas po unu seĝon en la komitato de UFE. Sed necesas fari pli. Kaj UFE pli regule kaj konstante rilatu kun la federacioj, kaj la federacioj pli vigle partoprenu en la decidfaro kaj politikapliko. Necesas ankaŭ, ke la diversaj federacioj pliintimiĝu, pli interŝanĝu kaj plihomogeniĝu unuj kun la aliaj.

Por plena rolo de la federacioj landskale, necesas pli densa kaj partopreniga rilato inter UFE kaj la federacioj, kaj plifortikigo de la interfederacia reto. Sur la tablo landa estas tiom por fari, ke ni kunaj nepre firmigu la federacian seĝon por la progreso de nia esperantista afero en Francio. ■

---

1. Dum ne ekzistas interna komisiono pri federacioj kaj lokaj movadoj en UFE, mi kiel nordfrancia prezidanto starigis en 2005 la t.n. Interfederacian Konferencon, kiu kunigas ĉiujn federaciestrojn en la ĉiujara landa kongreso, por diskuti kaj interkonsenti pri aferoj kaj problemoj propraj al la regionaj movadoj. La Konferenco tiel celas pliintimiĝon, interŝanĝojn kaj harmoniiĝon de la diversaj federacioj.
Vd. la protokolon de la dua Interfederacia Konferenco en 2006 : *http://federacioj.online.fr/konferenco/kunsidoj.htm*.